


DEMOKRATIA KOMUNIKADO • PEDAGOGIA EFIKECO

# NIA PONTO

**Grupo Esperantista de Bilbao**
Barrencalle Barrena, 7-1ª deks.
48005-BILBAO (Hispanujo)
✍ *Redaktas:*
Jesús-Miguel García Iturrioz

**Kunven-tago:**
Vendredo (19:30-21:00 h.)
☎ 619.694.683 (Iciar)
☎ 658.709.087 (Jesús)
💻 esperantobi@gmail.com

(La E-Grupo de Bilbao estis fondita la 20an de majo de 1906)
TTT-ejo: https://sites.google.com/site/esperantobi/home
En Fejsbuko, serĉu "esperanto grupo bilbao"

**Jar-kotizoj**: Normala: **60 €**. • Familia: **70 €**. • Juna (ĝis 30 jaroj): **20 €**.
**KUTXABANK-konto** (IBAN-kodo): **ES44-2095-0023-5122-1800-1550**

**APRILO-JUNIO 2026** **Nro. 147 (2/26)**

# Video pri la kongreso en Portugalete.



Danke al Asier, kune kun niaj samgrupanoj Yolanda kaj Carlos, oni pretigis videon pri la 84a Hispana Kongreso de Esperanto. Temas pri profesia altkvalita video, kiu donas kompletan vojaĝon tra la diversaj lokoj, kiuj rilatiĝas al la kongreso.

Rakontanto estis alia samgrupano, Susana, kiu ege trafe klarigis la diversajn bildojn.

Oni faris du versiojn: Esperante kaj hispane.

La video estis jam sendita al ĉiu kongresano kaj ankaŭ eblas spekti ĝin ĉe la HEF-retejo en

Hispanlingva versio:



**https://kongreso.esperanto.es/**

**LOKE**

## Demarŝojn por atingi la plenan propraĵon de nia sidejo.




Feliĉe ĉiuj leĝaj formalaĵoj estas jam plenumitaj kaj alvenis tago, kiam ni povas fiere diri ke nia sidejo, kie nestis la E-Grupo de Bilbao ekde la jaro 1958, apartenas al nia asocio.

Tio estis revo de diversaj generacioj de esperantistoj, sed la afero prokrastiĝis pro diversaj kialoj.

Bedaŭrinde tiu centra kaj sufiĉe granda spaco restas ofte senprofita pro manko de esperantistoj el Bilbao kaj ĉirkaŭaĵoj, kiuj malofte ĉeestas kunvenojn.

Ni esperu, ke iam ankaŭ tia situacio ŝanĝu.

## Daŭre ni kunvenas por organizi la kongreson.




La grupo, kiu stariĝis cele al organizado de la kongreso, kunvenas pli malpli unu fojon monate.

Se vi deziras engaĝiĝi al kongresorganizado, skribu al retadreso de la kongreso (portukongreso@gmail.com) kaj vi estos aldonita al vacapa grupo de organizantoj.

Ĉia helpo estos bonvena.

## Diversaj riparoj ĉe la konstruaĵo, kie estas nia sidejo.

Por informi al ĉiuj, sciu ke riparoj ĉe la konstruaĵo okupas grandan parton de la priokupoj de la estraro.

Ĝis nun estis Iciar, kiu "batalis" en la kunvenoj de la najbaroj, kie oni decidas pri tiuj senfinaj riparoj.

Post la lasta, granda kaj longdaŭra riparo, pro fuŝa instalado de skafaldo, pluvo falis laŭlonge de ĝi kaj frapis muron de la necesejo de nia Grup-ejo.

Entrepreno senkulpigis sin kaj diris, ke ni kulpas pro apero de humidaĵoj ĉar ni ne zorgis pri la muro kaj ke tiel aspektis de antaŭe.

Jen nova "batalo" kontraŭ entrepreno kaj najbaroj, kiuj ne deziras elspezi monon por ripari ion, pri kio, laŭ ili, ni "*kulpas*".

Oni vidos ...

## Retaj komunikiloj de la E-Grupo de Bilbao.

- Retejo: https://sites.google.com/site/esperantobi/home
- Retadreso de la Grupo: esperantobi@gmail.com
- Retadreso por la kongreso en Portugalete: portukongreso@gmail.com
- En Fejsbuko, serĉu "esperanto grupo bilbao"
- Vacapa rondo pri la kongreso (nur membroj de nia E-Grupo): petu aliĝon ĉe esperantobi@gmail.com

# 84a Hispana Kongreso en Portugalete

## 111 aliĝintoj.

Je la 7a de junio, 111 homoj jam aliĝis al la Hispana Kongreso, okazonta en Portugalete de la 14a ĝis la 18a de julio.

## Veturado tra la tuta provinco Bizkajo (Bizkaia).




Por veturado ene de la provinco Bizkajo, varme ni rekomendas aĉeton de transportkarton “Barik”. Karto kostas 3€. Aĉetebla ĉe la flughaveno, ĉe metrostacioj kaj ĉe multaj stratkioskoj.

Post aĉeto de karto, oni devas plenigi ĝin per mono. Por la kongrestagoj eble sufiĉos ĉirkaŭ 10€. Se bezonate, eblas replenigo.

Ĉiu karto povas esti uzata de kelkaj homoj. Ne forgesu uzi ĝin ankaŭ kiam eliras el veturilo. Dum kelkaj kongresaj ekskursoj ni uzos tiun karton.

Ĝi validas por ĉiuj transportiloj: metroo, busoj, pendoponto kaj ŝipeto en Portugalete, trajnoj de nacia kompanio RENFE, bilbaoa urba tramo, montotramoj, eĉ por veturi trajne al urboj kiel Gernika (40 km. de Bilbao) aŭ Donostia/San Sebastián (120 km de Bilbao).

## Bankedo kaj ekskursoj.

Kiel anoncite, ni limigis la nombron de partoprenantoj ĉar en kelkaj vizitontaj lokoj ne eblas la kunĉeesto de pli da homoj.

Tiuj limoj estas:

Ŝipveturado laŭ la rivero “Nervión”, de Portugalete ĝis Bilbao: 80 homoj.
Busekskurso kun vizito de historia forĝejo kaj muzeo: 58 homoj.
Bankedo: 65 homoj.

Por la aliaj aktivaĵoj, oni ne bezonos antaŭenskribiĝon. Tion oni faros kongresejo mem.

Ĝis la 07/06/2026, la enskribitaj homoj estis:

Ŝipo: 52.
Busekskurso: 44
Bankedo: 45.

# PROVIZORA PROGRAMO (84a hispana kongreso)

**Mardo 14/07.**

| | |
|---|---|
| 10:00 | Akceptado de kongresanoj. |
| 11:00/12:00 | Prelego pri Portugalete kaj informoj diversaj (Jesús M. García). |
| 12:00/13:00 | Bilbaoaj kantoj (Rafa Blanco). |
| 12:00/13:00 | Bilanco de 8 jaroj de E-kursoj en UNED (Félix Jiménez). |
| | |
| 15:30/17:30 | Marŝado tra Portugalete. Eliro el kongresejo. Senpage |
| 18:00/20:00 | Interkona vespero kun Lunĉo (Municipa sportejo "Pando Aisia") |

**Merkredo 15/07.**

| | |
|---|---|
| 10:00 | Akceptado de kongresanoj. |
| 10:00 | Libroservo. |
| 10:00/11:00 | Prestiĝo de Esperanto (Alexander Zdechlik). |
| 10:00/11:00 | Pri tradukado (Joxemari Sarasua). |
| 11:00/12:00 | Du esperantistoj inter la unuaj eŭskaj ministroj (Toño del Barrio). |
| 12:00/13:00 | Malfermo de la kongreso. |
| 13:00/13:15 | Komuna foto ĉe la ĝardeno antaŭ la kongresejo. |
| | |
| 15:30/18:00 | Marŝado ĝis urbo Sestao laŭ la riverbordo - Alta forno.<br>aŭ<br>Suprenirado piede al monto Serantes (452 m). |
| | |
| 20:00/21:00 | Muzika vespero ĉe la preĝejo de Sankta Maria. |

**Ĵaŭdo 16/07.**

| | |
|---|---|
| 09:30/11:00 | Magio (T. Badía/M. Burrutxaga). |
| 09:30/11:00 | Konversacia rondo-1 (Dalia Pileckiene). |
| 10:00/12:00 | Libroservo. |
| 11:00/12:00 | Artefarita Intelekto (Patxi de la Hoz). |
| 11:00/12:00 | Mallonga kurso pri eŭska lingvo-1 (Rafa Blanco). |
| | |
| 12:00/13:00 | Unamuno kaj origamio (Susana Zabaco). |
| 12:00/13:00 | Komiksoj en Esperanto (Eduardo Berdor). |

15:30/18:00 Marŝado tra apudmara urbo Getxo (*pr. Geĉo*).
aŭ
La Arboleda, antaŭa minista vilaĝo.
Per publikaj transportoj (Buso+Kablotramo).

19:00 Vizito piede al apuda urbo Santurtzi (Santurce), kie oni celebras la feston de “Virgulino de Karmen” (“Nia Sinjorino de la Monto Karmelo”), protektantino de maristoj.

**Vendredo 17/07.**

10:00/11:00 Ĝenerala HEF-kunveno.
10:00/11:30 Konversacia rondo-2 (Dalia Pileckiene).
11:00/12:00 Blisa Skribo - lingvo sen voĉo (Bogusław Ubik-Perski)
11:00/12:00 Mallonga kurso pri eŭska lingvo-2 (Rafa Blanco).
11:00/12:00 Kunveno de la HEF-estraro kun hispanaj E-grupoj.
12:00/13:00 Kongresa fermo.
13:00/13:15 Rea komuna foto ĉe la ĝardeno antaŭ la kongresejo.

15:00/19:00 Perŝipe el Portugalete ĝis Bilbao laŭ la rivero.
(**Maksimuma nombro de partoprenantoj: 80**)
Suprenirado per kablotramo al monto Artxanda (251 m.).
(Nepre kunportu transportkarton “Barik”).
Panoramo de Bilbao.
Vizito al malnova kvartalo de Bilbao.
Vizito al E-Grupejo. Lunĉo.

**Sabato 18/07.**

09:00 Renkontiĝo ĉe la kongresejo. Enaŭtobusiĝo.
(**Maksimuma nombro de partoprenantoj: 58**)
09:20/10:00 Vizito al La Arboleda, antaŭa minista vilaĝo.
10:30/12:00 Forĝejo El Pobal.
12:20 Gallarta (naskiĝloko de Dolores Ibárruri, "Pasionaria").
12:30/14:00 Muzeo pri minejoj.

14:30 Komuna bankedo (“Batzoki” de Santurco - 10 min. piede de la kongresejo).
(**Maksimuma nombro de partoprenantoj: 65**)

**EKSKURSOJ, LUNĈOJ KAJ BANKEDO.**

**Mardo 14/07.**

15:30/17:30 Marŝado tra Portugalete (Eliro el kongresejo). Senpage.

18:00/19:30 Interkona vespero kun senpaga lunĉo. Loko: Municipa sportejo "Pando Aisia".

**Merkredo 15/07.**

15:30/18:00 Marŝado apud la rivero ĝis apuda urbo Sestao. Vizito de alta forno. Senpaga ekskurso.

Alternative, suprenirado piede al monto Serantes (452 m). Bela panoramo. Senpaga ekskurso.

**Ĵaŭdo 16/07.**

15:30/18:00 Marŝado tra apuda urbo Getxo (pr. Geĉo), la ekonomie plej altnivela urbo de Vaskio/Eŭskio. Oni devas transiri la riveron, do kunportu transportkarton "Barik". Prezo: inter 1,00 kaj 1,50 €.

Alternative, vizito al "La Arboleda", antaŭa minista vilaĝo, per publikaj transportoj (Buso+Kablotramo).

Kunportu transportkarton "Barik". Prezo: inter 3,00 kaj 4,00 €

**Vendredo 17/07.**

15:00/19:00 Perŝipe al Bilbao laŭ la rivero (ĉirkaŭ 12 km).

Eliro el Portugalete; 15:00. Alveno en Bilbaon (proks.: 16:00 h.)

Posta suprenirado, per kablotramo, al monto Artxanda (251 m.). Panoramo de Bilbao. Kunportu transportkarton "Barik". Prezo: ĉ.2,00€.

Posta vizito piede al la malnova kvartalo de Bilbao.

Fine, vizito al E-klubejo de Bilbao. Senpaga lunĉo.

Maksimuma nombro da partoprenantoj en la ŝipveturado: 80 (laŭ alveno de pagoj). Prezo de la ŝipo: 10,00 €.

**Sabato 18/07.**

09:00 Eliro el Portugalete per buso.

09:20/10:00 Vizito al "La Arboleda", antaŭa minista vilaĝo.

10:30/12:00 Forĝejo "El Pobal".

12:20 Gallarta (naskiĝloko de Dolores Ibárruri, "Pasionaria").

12:30/14:00 Muzeo pri minejoj.

Maksimuma nombro da partoprenantoj: 58 (laŭ alveno de pagoj).

Prezo: 20,00 € (inkluzivas buso, forĝejo kaj muzeo).

14:30 proks., tuj post la busekskurso, **Fina adiaŭa bankedo**.

Ĝi okazos en urbo Santurtzi (tre proksime de la kongresejo) ĉe "Batzoki". Maksimuma nombro da partoprenantoj: 65. (laŭ alveno de pagoj). Prezo: 35,00 €.

**HEF**

## 99a kongreso de SAT.

Kiel anoncite, la ĉi-jara kongreso SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda) okazos en la hispana urbo Leono (León), de la 19a ĝis la 26a de julio, tuj post la hispana kongreso en Portugalete.




Kongrestemo estos "Paco kaj militoj. Datreveno de la hispana enlanda milito (1936/1939)".

## Internacia Junulara Kongreso en Katalunio.

Ĉijare estos alia internacia kongreso en Hispanio. La 82-a Internacia Junulara Kongreso de Esperanto (IJK) okazos en Katalunio, konkrete de la 9-a ĝis la 16-a de aŭgusto 2026 en kongresejo situanta en la urbeto Tiana, nur 15 km for de Barcelona.

Tio estos mirinda ŝanco por partopreni internacian etoson, ne nur por junuloj, sed ankaŭ por plenkreskuloj.

Eĉ dum ĝi eblos ĝui esceptan naturan fenomenon: la **sunan eklipson** kiu estos videbla en la nordo de la iberia duoninsulo la 12-an de aŭgusto. Vidu pliajn detalojn ĉe la retejo https://ijk2026.tejo.org/.

*(El interreto. Feb. 2026)*

## NOVA FANZINO EN ESPERANTO.




Antaŭ kvar numeroj ni informis pri amatora revueto (fanzino) eldonita de la lernantoj de kurso en Segovio, "FrenezZono". Nun ni informas pri alia iniciato el Taragono: "Kometo".

Temas pri sesmonata fanzino pri strangaj mondoj, eldonata de Associació Cultural Ĝuo. Kiel ĉiu vera fanzino, ĝi naskiĝas el eksperimentemo, sendependeco kaj amo al memfarita kulturo, kaj ĝenerale cirkulas en malgrandaj rondoj. En ĝiaj paĝoj oni trovas ne nur rakontojn, sed ankaŭ artikoletojn pri historiaj aŭ marĝenaj temoj, pri kiuj ne ĉiam facilas decidi, ĉu temas pri fakto aŭ fantaziaĵo.

Kometo volas ludi ĝuste en tiu malcerta spaco inter realo kaj fantasto, montrante, ke la limo inter ambaŭ eble estas multe malpli firma, ol oni kutime supozas. Tiel Kometo fariĝas preteksto por paroli pri niaj revoj, timoj kaj obsedoj, kiuj speguliĝas en strangaj rakontoj kaj eblaj mondoj.

Oni povas elŝuti la retan version de la fanzino ĉe **Bitoteko**. Eblas ankaŭ sekvi Associació Cultural Ĝuo ĉe Instagramo kaj viziti la eldonan projekton ĉe: **www.kratero.eu**.

*(El "La Bitbulteno" de HEF. N-ro. 106. Aprilo 2026)*

**TRA LA MONDO …**

## LA 113-A UK OKAZOS EN 2028 – EN KAŬNO, LITOVIO!

La Estraro de Universala Esperanto-Asocio (UEA) kun ĝojo anoncas, ke la 113-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) okazos en Kaŭno (Kaunas), Litovio, en 2028.

Post Melburno/Narrm en 2027 la UK revenos al Eŭropo kaj same revenos al Litovio kaj al Baltio post la 90-a UK en Vilno en 2005.

Okazonte la unuan fojon en Kaŭno, la 113-a UK gastiĝos en la dua plej granda urbo de Litovio kaj unu el la plej gravaj kulturaj centroj de Baltio.

La elekto pri Kaŭno aldone havas historian kaj simbolan signifon por la movado: la urbo ankaŭ estas forte ligita al la historio de Esperanto. En Kaŭno naskiĝis Klara Zilbernik, la edzino de L. L. Zamenhof kaj unu el la plej gravaj subtenantoj de la frua Esperanto-movado, sen kies malavara gesto kaj amo ne estus publikigita la Unua Libro.

*(Gazetaraj Komunikoj de UEA. N-ro 1301. 25-05-2026)*

## FORPASIS PROBAL DASGUPTA, EKSA PREZIDANTO DE UEA KAJ PREZIDANTO DE LA AKADEMIO DE ESPERANTO.



La 1-an de junio 2026, en la aĝo de 72 jaroj, en Kolkato (Barato), forpasis Probal Dasgupta (1953–2026). Li naskiĝis la 19-an de septembro 1953 en la sama urbo.

Lingvisto kaj leksika esploristo. Lerninte Esperanton en la aĝo de 14 jaroj kaj membriĝinte en Hinda Instituto de Esperanto kaj en UEA en la aĝo de 15 jaroj, li ekde 1967 estis aktiva esperantisto. En la aĝo de 17 jaroj li aktive korespondis kun Kolomano Kalocsay pri la tradukado de Tagore pri komplikaj gramatikaj problemoj.

En 1980 li volontulis preskaŭ la tutan jaron en la CO. Membro de la Akademio de Esperanto ekde 1983, fariĝis ĝia vicprezidanto de 2001 ĝis 2016 kaj ĝia prezidanto ekde 2016 ĝis sia forpaso.

Elektita Prezidanto de UEA en 2007 dum la UK en Jokohamo kaj reelektita por nova mandato en 2010 dum la UK en Havano.

Probal Dasgupta estis voĉo por lingva diverseco kaj unu el la grandaj intelektuloj de Esperantujo. Lia intelekta laboro kaj lia sindediĉo al Esperanto, lingvistiko kaj internacia interkompreniĝo lasas neforviŝeblan spuron en la historio de UEA kaj de la tuta Esperanto-komunumo. Laŭ la familio li forpasis dumdorme, senpeze, kongrue kun lia amika kaj afabla karaktero.

*(Gazetaraj Komunikoj de UEA. N-ro 1303. 2026-06-02)*

## Rusia E-Unio plu aneksas Ukrainion.

La rusia landa asocio de UEA decidis krei regionan fakon en plia okupita teritorio de Ukrainio. Jam en 2016 REU en la praktiko agnoskis la kontraŭleĝan anekson de Krimeo, registrante Krimean Esperanto-Centron kiel sian regionan organizon. Nun ĝi kreas regionan fakon ankaŭ en la tiel nomata “Donecka Popola Respubliko”.

*(“Libera Folio”. 12/05/2026)*